

La babiladaj rondoj

okazas vendrede je la 19a horo.
La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (ĉefmanĝon kaj deserton).
La invititoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens, la gastiganto preparas terpomojn kaj deserton. La gastoj alportas fromaĝojn, trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. La salono estas pagata el la kaso

Ambaŭgrupa babilada rondo okazos la 18-an de majo, je la 19-a, ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier, av. des Alpes 150, Montreux (021 961 38 56) ➤ Aliĝu nepre ĉe "doodle"

"Okcidenta grupo":

Ve, la 27-an de aprilo



ĉe François Randin

Vallombreuse 14, Lausanne

021 647 29 28 / 076 411 14 55

Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd>

"Orienta grupo":

Ve, la 18-an de majo



Vidu ambaŭgrupan

babiladan rondon, ĉi supre

Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6>

La Magia Lando: La du unuaj tagoj de filmado okazos sabate la 28-an kaj dimanĉe la 29-an de aprilo posttagmeze en Espace Dickens. Ni bezonas vian ĉeeston speciale dimanĉe; vi estas invitataj por manĝi je la 12h30.

Laŭzana Esperanto - Societo

ĉe F. Randin - ch. de Vallombreuse 14 * CH - 1004 LAUSANNE

+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

<https://www.facebook.com/esperantolausanne>

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 -

Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Laŭzana Esperanto - Societo

Informilo

majo 2018 - n° 05

Kunsidoj okazas monate
ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Lausanne

Lunde, la 7-an de majo 2018, je la 20-a

"En 1959, mia unua Esperanto Kongreso"

David Bühlmann, nia prezidanto, rakontos al ni sian sperton pri kaj dum tiu kongreso.



⇒ Sabate la 23-an de junio
Jara ekskurso
en Morges

Vidu ĉi malantaŭe



Somera paŭzo. Ni renkontiĝos denove :

⇒ Lunde la 3-an de septembro.
Temo decidota.

Leĝoj ekzistas, kiuj protektas la liberecon de la gazetara esprimado, sed neniu, kiu valorigas ion por protekti popolamason kontraŭ la gazetaro.



Novaĵo

Nia vicprezidantino, Charlotte Blanc Maillard, suferis gravan malsanon kaj estis enhospitaligita dum kelkaj semajnoj. Ni bondeziras al ŝi rapidan kaj plenan resaniĝon.

Jara ekskurso en Morges la 23-an de junio

Ekde longa tempo mia frato, Daniel Georget, respondecas pri la turisma malgranda trajno de Morges. Li tre volonte akceptis esti la gvidisto por nia jara ekskurso kaj eĉ proponis specialan rabaton por ni !

Tiu trajno funkcias per gaso. Ĝi belegas dank'al siaj svisaj koloroj, ruĝa kaj blanka.

Mia frato promeniĝos nin laŭ la lagaj kajoj, en la malnovan urbon, en "Parc de l'Indépendance" kaj tra la vinberejoj dum la unua parto de la mateno.

Poste ni bonŝancos malkovri la "Maison de la Rivière", kie ni povos mergiĝi en plena naturo, entuziasmiĝi pri ĝia beleco kaj ankaŭ ekkonscii pri la rompiĝemo de la ekosistemo.

Tie ni admiros multajn diversaĵojn : vivajn fiŝojn, la submarŝipon "François-Alphonse Forel" de Jacques Piccard, altan teknikan tuŝmuron, didaktikan lageton, ktp. Ni ankaŭ aŭdos historiajn kaj sciencajn anekdotojn. Certe ni multe lernos dum tiu vizito.

Mi ĝojegas revidi vin en tiu okazo, esperante favoran veteron !

Cléa.

➤ Vidu la ĉi-kunan folion pri la programo kaj la prezoj. ◀



Tra Maigret al la homa naturo

De Sylvan Zaft, en Literatura Foiro n-ro 183, febr. 2000

Daŭrigo de la pasinta informilo kaj fino.

Per iuj vizitoj Maigret lernas multe pri tiu s-ro Parendon, pri lia edzino, liaj infanoj, la kunlaborantoj kaj servistoj. La apartamento situas en la najbaraĵo, kie loĝas la Prezidento de la Respubliko. Ĝi estas impona domo kun fenestroj pli ol tri metrojn altaj, kun grandaj portretoj, kun tre valoraj mebloj, kun multe da silento.

Parendon, kiu similas gnomon, estas tre inteligenta. Longtempe li deziris diskuti artikolon 64 kun Maigret, kaj kiam Maigret aperas antaŭ li, tio estas kiel neantaŭvidita donaco. Ĉiuj en la domo, kun kiuj Maigret parolas, ne estas tiel bonvenigaj. Maigret ne povas fari multon utilan aŭ efikan, ĉar ĝis nun neniam krimo okazis.

Iun tagon, kiam Maigret komencas esperi, ke krimo ne okazos, li ricevas telefonavokon pri iu en la domo, kies gorĝon oni tranĉis. Kun tiu homo li jam havis longan konversacion. Li trovis tiun tre simpatia. Nun li devas malkovri ties murdinton.

Kaj fone ŝvebas artikolo 64. Ĉu la mortiganto vere, laŭleĝe, estas kulpa ? Tre forte prezentiĝas la emocioj de Maigret, liaj frustracioj, timoj kaj esperoj. Iam verŝajne lia menso ne precize funkcias. Ideoj ŝvebas je la sojlo de konscio. Maigret iĝas grumblema.

La aŭtoro celis grandegan legantaron, kiun li fakte atingis. Vendiĝis centmilionoj da ekzempleroj de liaj libroj. Unu el la kialoj por lia sukceso estas, ke liaj libroj flue legeblas.

Simenon konscie uzis negrandan vortstokon. Li tre zorge aranĝis la eventojn de la rakontoj kaj la perceptojn kaj eksciojn de la ĉefrolulo. Kiel la originalo, la stilo de la traduko estas klara kaj la esperanta versio legatas flue.

Simenon, kiu verkis centojn da romanoj, estis majstro de la psikologia romano, kaj li uzis tiun majstrecon same, kiam li verkis detektivajn romanojn. André Gide skribis: "Simenon estas la plej granda romanisto el ĉiuj, la plej vera romanisto, kiun ni havas en la literaturo". Tiu, kiuj legos "Maigret hezitas", ne nur ĝuos altnivelan detektivan romanon. Ili pliprofundigos sian komprenon pri la homa naturo.